EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:01, januaro 5.** Pezo: Word 40, PDF 400 KB, sume 440 KB

## Novjara saluto el Kongo DR

COPROFER estas la Komitato por la Promocio de Virinoj en Kamparaj Regionoj en Kongo DR. Vidu informojn ĉe: https://www.miavivo.net/organizoj/




## Vicprezidanto de UEA novjare salutas

Ĵus aperis la 1-a video de la nova jaro en UEAviva!: https://youtu.be/B5TB6P_ka5M

'UEA estas nia, UEA estas ni' estas kanto farita de Joel Muhire por la membroj de Universala Esperanto-Asocio (UEA), speciale farita por la fermo de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), okazinta en novembro 2023. Nun 'UEAviva' spektigas ĝin por ĉiuj!]. En 2024, la jaro de la unua Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Afriko, mi dankas pro via subteno al UEA per membriĝo: https://uea.org/alighoj/alighilo kaj aliĝo al la 109-a UK: https://uk.esperanto.net/2024

Fernando Maia Jr., **Universala Esperanto-Asocio, unu el du** Vicprezidantoj

## Gratulon al la iama prezidanto de UEA



En la unua tago de 2024 estas festata la centa naskiĝdatreveno de **Grégoire Maertens**, prezidanto de UEA inter 2000 kaj 2006, naskiĝinta la 1-an de januaro 1924. *La Ondo de Esperanto* sendas al li bon- kaj san-dezirojn! La listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por januaro 2024, kompilita de Aleksander Korĵenkov, aperis en la vintra/decembra kajero de 'La Ondo de Esperanto' kaj en la retejo https://sezonoj.ru/2024/01/januaro-8/.

**SMG**: La foto montras Grégoire kun la nepo Rakoen, kiu nun aktivas movade. La foto estis farita dum la jubilea kongreso en Lillo, Francio en 2015.

## Katalunaj junuloj kunvenos februare

La Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) invitas vin al sia junulara Esperanto-aranĝo, de la 23a ĝis la 25a de februaro 2024 en L'Espluga de Francolí! RenKEJtiĝo estas la oficiala plurtaga aranĝo de KEJ, por junaj esperantistoj kaj de Katalunio kaj de ĉie. La nomo estas vortludo kun la Esperanta vorto "renkontiĝo" kaj la mallongigo de la asocio. En 2023 KEJ unuafoje organizis RenKEJtiĝon, kiu estis tre sukcesa. La renkonto de 2024 okazos en L'Espluga de Francolí (Taragono) ekde vendredo la 23-a ĝis dimanĉo la 25-a de februaro 2024. La gastejo estos Alberg Xanascat L'Espluga. Ni kuraĝigas vin partopreni kaj ĝui bonegan etoson kune! https://www.esperanto.cat/junularo/la-renkejtigo.




Laŭ la 92-a Bitbulteno de HEF

## Revuo Orienta kun nova adreso

JEI raportas: La retadreso de nia redakcio en Japanio ŝanĝiĝis. Jen la nova retadreso: revuo−orienta@jei.or.jp

## Novjara poezia bukedo de Penseo

Iu ŝajnis frapi mian pordon
Pro kio bruis la falintaj folioj en la korto
Mi balais ilin ĉiujn en travideblan plastan poŝon
Aŭtuno, rampante en ĝi
Rubekolo kun branĉo de artemizio preterflugis la fenestron
Nur tiam mi scias, kiom vi sopiras la solecon de polvo
Skribita letero ne estu sendita
Ĉar mi ĵus aŭdis, ke skeletoj en profunda monto tondre eksplodis.

* Lofu, fama ĉinlingva poeto, Luofu (1928 - 2018), kandidato al Nobel-premio, li estas konata kiel la "Poezia Demono" en poezia rondo. (tradukis Ardo)


Prenita el Penseo 387, pretigita en Ĉinio. Kiu deziras la plenan numeron de Penseo, skribu al vejdo@163.com

## Pola studado

Studu Esperanton ĉiusemajne kun aliaj esperantistoj, loĝantaj en diversaj landoj. La Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando, proponas al esperantistoj de la tuta mondo du novajn kursojn gvidotajn vive en la reto:

1. Lingva precizeco,
2. Verkado de tekstoj.

Aliĝu rapide, nepre en januaro.




**Maria Majerczak, mmajerczak@gmail.com**

## Sumoo invitas al libro-legado

La 85-a Internacia Sumoo komenciĝos la 14-an de januaro. Aliĝu ĉe:

**HORI Jasuo:** hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp

## La Panteono fermis la jaron 2023

Okaze de la 22-a naskiĝtago de la paĝaro de edukado.net ni denove festas per premiado de personoj, kies agado en tiu ĉi jaro aŭ dum vivlongo multe kontribuis al la instruado kaj disvastigo de nia lingvo. Ni kreis la Panteonon por hejmigi en unu loko niajn heroojn. Nia Panteono estas ne nur por forpasintoj, sed ankaŭ vivaj aktivuloj povas eniri ĝin kun memverkitaj biografioj. Do, estas ĝuste ili, kiuj jam scias la ĝojigan novaĵon kaj nun venas la vico de la movadanoj, kiuj povas ekkoni, kiujn ni elektis ĉi-jare por la premioj.

Ni havas sep novajn panteonanojn: Ngọc Lan Nguyễn Thị (Vjetnamio), Françoise Noireau (Francio), Inhye Gim "Ella" (Sud-Koreio), Elda Doerfler (Italio), Li Weilun (Ĉinio), Vicente Manzano-Arrondo (Hispanio) kaj Heinz-Wilhelm Sprick (Germanio).


Sep novaj panteonanoj en 2023

Korajn gratulojn al niaj elektitaj gekolegoj, kaj koran dankon al ĉiuj en la mondo, kiuj instruas aŭ agadas por la disvastigo de nia lingvo.

**Katalin Kováts,** redaktoro de edukado.net

## Hungara-Kroata kunlaboro

Interkonsento pri partnera kunlaboro inter Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) kaj Kroata Esperanto-Ligo (KEL) estis subskribita ankoraŭ en 2011, kaj okaze de la ĉi-jara Zamenhofa tago, ĝi donis ankoraŭ unu belan frukton. Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Đurđevac organizis grupon de dudeko da kroataj esperantistoj kaj venigis ĝin la 16an kaj 17an de decembro gaste al budapeŝtaj esperantistoj. Kroatoj, membroj de KEL el diversaj urboj, estis gastigitaj de Hungaria Esperanto-Asocio. HEA organizis komunan festadon de Zamenhofa tago la 17an de decembro antaŭtagmeze en la kulturcentro “Tegoldomo” (Cserepesház) en la Budapeŝta distriko Zugló. La programon partoprenis kvindeko da esperantistoj.



========= vortoj: 1150 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE).

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**

ilei UMEA KEF

**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj**

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj 2023 ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>.